# GERMANA FONDAĴO DE FAMILIO FISCHER (FFF)

# INVITAS FAMILIOJN

Ekde 2008 ekzistas la Fondaĵo de Familio Fischer (FFF) en Germanio.

Ĝi havas du diversajn celojn, nome unue, finance subteni oficejon de Germana Esperanto-Asocio, kaj due, ebligi al subtenindaj familioj partoprenon en Esperanto-aranĝo de Germana Esperanto-Asocio. Prezidantoj de la fondaĵo estas d-ro Rudolf Fischer (por la unua celo) kaj s-ino Hedwig Fischer (por la dua celo).

FFF nun alvokas subtenindajn familiojn, kandidatiĝi por la partopreno en la

## 26-a Printempa Semajno Internacia

de la **2-a ĝis la 9-a de aprilo en 2010** (dum pasko),

en **Sankt Andreasberg, montaro Harz**, vidu http://www.esperanto.de/psi/

Kiel "familio" validas ĉiu grupeto de plenkreskulo(j) respondeca(j) por akompananta(j) infano(j) aŭ junulo(j). Ĉiuj subtenatoj devas esti esperantistoj, t.e. paroli Esperanton aŭ voli lerni ĝin dum la aranĝo. La familio estas subteninda, se ĝi sen la subvencio ne povus pagi la partoprenon. La subvencio povas ampleksi parton aŭ la tuton de la partoprenkotizoj inkluzive loĝadon kaj manĝojn, sed ne kovras la vojaĝkostojn kaj poŝmonon. Kandidatoj ekster Germanio bezonas rekomendon de sia nacia Esperanto-organizo. Loĝantoj de Germanio estu ordinaraj membroj de Germana Esperanto-Asocio aŭ Germana Esperanto-Junularo. Pliajn detalojn fiksos la prezidanto de la fondaĵo kun la kandidatoj individue laŭ la aktuala situacio. Ĝi rezervas al si la rajton malakcepti subvencipetojn sen la devo klarigi tion.

Sinproponojn oni direktu al la prezidanto de FFF:

*s-ino Hedwig Fischer,*
*Gustav-Adolf-Str. 2a, DE-48356 Nordwalde, Germanio.*
*fischerh@uni-muenster.de*